

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 03/09/2020 Kvarcentnaŭdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **737,500** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **286,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **13,500** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)


Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LA ENKONDUKO DE "THE ESPERANTO-TEACHER".

N.ro 0 de "Por Komencantoj".



Ĉiuj lingvoj malhavas kelkajn literojn, sonojn, kiuj ekzistas en kelkaj aŭ multaj aliaj lingvoj. Ekzemple francoj, nederlandanoj, germanoj, kaj multaj aliaj trovas tre malfacila, diri la anglan sonon th en la vortoj "there" kaj "theory", ĉar la muskoloj en la buŝo por diri tiujn sonojn ne adaptiĝis al tio kiam ili estis tre junaj. La plej malfacila por angloparolantaj Esperantistoj estas la sono de la diftongo "eŭ" en ekz. Eŭropo, sed provu la jenan helpilon: diru dek- aŭ dudekfoje komencante per la angla vorto "now" malrapide ŝanĝante la sonon de "ow" al "ew" grade pli kaj pli antaŭtirante la langon kaj malfermante la malsupran makzelon (jaw) ĝis la sono atingas "eŭ" de Eŭropo, sono kiun kelkaj anglaj (londonaj) parolantoj malelegante uzas por diri "now". Zorgu ke la "w"-parto de "aw" en "now" restas en "eŭ". Vi povas fari la samon el de "najlo" al "mejlo" kaj de "mejlo" renverse al "najlo".

(daŭrigota)

Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Bonaj homoj surportas maskojn

Protektilo por la **surportanto** sed ankaŭ por la **proksimuloj**

Ĉu vi sentas vin pli sekura nun?? **Roger Springer**



Rigardo en la estontecon



Antaŭ ol ni rigardu en la estontecon necesas, ĉu ne? ke ni unue rigardu en la estintecon. Sed mi, mi ankoraŭ ne scias pri vi, bedaŭrinde ankoraŭ ne evoluigis sufiĉe kleran inteligentecon por kompreni ĉion! Do tio, kion vi espereble tre baldaŭ legos, eble ne tute plaĉos al vi, ĉar inter ni, tiel nomataj homoj, estas ja ankoraŭ multege da tre ege malsamaj diferencoj, ĉu ne?

Do, ĉar neniuj scias kiam komenciĝis la estinteco, ĉar oni ja parolas pri la eterneco, ni ne scias la daton, kiam ĉio komenciĝis. Sed iam ekestis la diversaj planedoj, kaj ankoraŭ hodiaŭ subite ekestas unu post la alia. Iam en la estinteco naskiĝis tiu ĉi nia Tero. Sed sur ĝi estis nenio. Sed iom post iom aperis sur ĝi akvoj, montoj, iom poste herbo, arboj ktp. Tiam ekaperis vivaj estuloj, kelkaj homoj preferas diri – kaj skribi “estantoj” tial mi skribas “estuloj”. Tiuj estuloj estis ege malgrandaj kaj nevideblaj, sed estis ja neniuj aliaj estuloj por rigardi ilin, do ĉio estis bona, eĉ bonega.

Tiuj estuloj vivis iom da tempo. Tiam ili liberiĝis de siaj nevideblaj korpoj kaj iris hejmen por ripozi kaj esti juĝataj. Tion vi ĉiuj jam scias, ĉu ne?

Post iom da tempo da studado ili reaperis sur la Tero kun videbla materia korpo. Tiam estis du malsamaj estuloj, la nevideblaj estuloj kaj kelkaj novaj videblaj estuloj. Post iom da tempo ili liberiĝis de siaj materiaj korpoj, iris hejmen ktp. ktp. Tio okazis kaj ankoraŭ okazas kaj nun estas milionoj kaj milionoj da malsamaj estuloj sur nia planedo Tero. Baldaŭ estos eĉ homoj. Ĉu homoj estas la ĝusta nomo? Ĉerte ne! Mi supozas ke niaj sciencistoj inventis tiun nomon por la plej evoluantaj bestoj inter ni. La sciencistoj mem ankoraŭ ne estas homoj. Homoj ne estas kruelaj. Homoj ne krimas. Homoj ne enkarcerigas la bestojn. Homoj ne mortigas bestojn. Homoj ne vestas sin per la haŭto de la bestoj. Homoj ne manĝas la kadavrojn de la bestoj. Se tio daŭros pli longe, la Kreinto de ĉio plejege verŝajne punos tiujn bestojn, kiuj erare nomas sin homoj, per iu terura malsano, kiu, se la homsimilaj bestoj eĉ ne provos plibonigi sin, mortigas unu post la alia tiujn bestojn kiuj nomas sin homoj. Tio povas okazi tre baldaŭ. Plej verŝajne tio jam okazas!

Sed en la komenco de la eterneco tiuj jam multaj “homoj”, same kiel ni hodiaŭaj “homoj”, tre ŝatis vojaĝi. Sed ankoraŭ ne estis inventitaj la flugmaŝinoj, nek la trajnoj, nek aŭtobusoj, nek tramoj, nek vaporŝipoj ktp. Do, la amikemaj “homoj” devigis la verajn bestojn, azenojn, kamelojn, dromedarojn, ktp. eĉ la bonkorajn ĉevalojn porti la valizojn kaj kofrojn sur siaj dorsoj, kaj ne nur tion, ili kruele sidigis sin mem sur la dorsojn de la amikemaj veraj bestoj, kiuj do devis

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE

suferi la pezon, eĉ pezegon, de tiuj fieraj estuloj, kiuj erare konsideris sin multe pli bonaj ol tiuj, kiu faris la necesan laboron.

Sed iom post iom, iuj el la kruelaj “homoj” inventis ankaŭ veturilojn. Kompreneble la bonkoraj bestoj devis tiri tiujn veturilojn, sed tamen. Nun eblis veturi de lando al lando turmentante la bestojn, sed ĝuante la vojaĝon. Kaj ne nur veturilojn oni inventis. Oni inventis ankaŭ velŝipojn kiuj ebligis onin transiri la maron, pardonu min, mi devus esti dirinta marojn, ĉu ne?

Kion oni trovis en la aliaj landoj? Aliajn “homojn”, sed oni ne povis paroli kun ili. Ili ĉiuj parolis iun lingvon, sed ĝi estis nekomprenebla. Kaj, amuze, ĉu ne? la “homoj” kiuj troviĝis en tiuj aliaj landoj, ankaŭ konsideris la lingvojn parolatajn de la intrudantoj, nekomprenebla. Do, laŭ la tiama nivelo de inteligenteco, ambaŭ partioj konsideris unu la aliajn demonoj kaj malamikoj, kaj ekestis militoj inter ili. Sed, kiam la “homoj”, espereble tre baldaŭ, kiom eble plej baldaŭ, estos civilizitaj, ekestos tutmonda kaj eterna paco sur la Tero. Sed, kompreneble, nur se la homoj volas tion!

Sed la frenezaĵo daŭris. Oni inventis pontojn, per kiuj oni povis transiri la akvon. Se la akvo estis tro larĝa oni inventis tunelojn, kiuj iris sub la akvon. La angloj kaj la francoj inventis tian modernaĵon tra kiu veturas trajnoj kaj aŭtoj. Nun eblas veturi de Parizo al Londono en nur du horoj. Kaj amuze, ĉu ne? Oni povas iri ankaŭ de Londono al Parizo en ekzakte la sama tempo, do, ankaŭ nur du horoj.


Tio impresis la danojn kaj ankaŭ la svedojn. En mia tempo, kiam ni estis almenaŭ same amikemaj unuj al la aliaj, oni bezonis du horojn por ŝipveturi de Kopenhago al Malmö. Kaj ankoraŭ du horojn por iri de Malmö al Kopenhago. Oni fieris pri tio. Iri de unu lando al alia en nur du horoj, ĉu ne? Sed nun tio neniel sufiĉas. Kion fari? Oni volis kopii la sukceson de la francoj kaj angloj. Oni konstruis artefaritan insulon en la mezo de la maro inter Danujo kaj Svedujo.

De Kopenhago oni konstruis fervojan linion al tiu artefarita insulo en la mezo de la maro. De tiu insulo oni konstruis submaran tunelon kun daŭrigo de la fervoja linio kun la rezulto, ke nun oni ne plu bezonas du horojn por vojaĝi de Kopenhago al Malmö, nek de Malmö al Kopenhago. Ekzakte 13 minutoj sufiĉas!

Sed kio pri la estonteco? Kion ni povos atendi? Tre baldaŭ la homoj fariĝos pli kaj pli mallaboremaj. Ili volas vojaĝi de unu lando al alia, kompreneble. Ili faros tion, ili amikiĝos unuj kun la aliaj. Iu jam inventis komunan lingvon por ĉiuj “homoj” en la mondo. La “homoj”, kompreneble lernos ĝin, fariĝos geamikoj kaj rifuzas la ordonojn kaj mensogojn de siaj registaroj kaj paco tutmonda regos en la tuta mondo. La “homoj” fariĝos homoj, sed, bedaŭrinde, la militemaj registaroj restos nur “homoj”!

En la baldaŭa estonteco la homoj daŭrigos sian evoluon. Ili jam konas kaj amas unuj la aliajn kaj nun ili kune laboras por plibonigi ne nur nian planedon Tero, sed ili forte deziras amikiĝi ankaŭ kun homoj sur la multaj aliaj planedoj.

Io devas okazi, konstrui fervojajn liniojn sub la maro kaj flugmaŝinojn ne plu sufiĉas. Ili do, kiom eble plej baldaŭ, konstruos ankaŭ liftojn, per kiuj ni povos, se ni kuraĝos, rapidege iri de sur la Tero al kiu ajn alia planedo en la tuta universo. Unue tio plaĉos al la multaj restantaj registaroj, ili esperegos okazigi militojn kontraŭ tiom da aliaj estuloj, sed iom post iom, ankaŭ la registaroj sur la aliaj planedoj,



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

same kiel la enloĝantoj de tie, lernos la universalan lingvon kaj rifuzos militiri unuj kontraŭ la aliaj. Eĉ registaranoj fariĝos homoj, ĉu ne? **Bob Felby**




Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
MondaFest' - La Monda Festivalo de Esperanto - 20 junio - 20 septembro
Festivala Kuriero
13-a de aŭgusto 2020, numero 12
Redaktas: Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova

Ni aŭskultu la indigenojn de nia mondo: indigenaj voĉoj en la Monda Festivalo de Esperanto

Okaze de la Internacia Tago de la Indigenaj Popoloj de la Mondo, la 9-a de aŭgusto 2020, la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) proponis al la publiko kelkajn videojn kaj leĝojn.

proponis sin. La 5-an de aŭgusto kvin el ili povis prezentiĝi.
La trian premion gajnis Michael Boris Mandirala:
La duan premion ricevis Raoni Sousa:




La virtuala Universala Kongreso aperigis retajn kurierojn

Aperis la dekdua numero de la Festivala Kuriero. Legu, ĝuu, senpage elŝutu, libere kaj aktive diskonigu ĝin al viaj amikoj en Esperantujo! Troveblas tie ankaŭ la pli fruaj kurieroj.

<https://revuoesperanto.org/kuriero12>

Amike, **Katja Steele**



Virtuala Kongreso de UEA Demandaro pri VK via opinio gravas al ni **Katja Steele**

Ĉiu registrita enhavo de la VK ankoraŭ disponeblas por spektado en nia virtuala kongresejo: <https://vk.retevent.com/> – ĝis la 20-a de septembro!

Se vi volas rekomendi la enhavon al amikoj, ankoraŭ eblas aliĝi al la VK per <http://vk.mondafest.net/> – tio cetere estas maniero plu subteni nian laboron!

Post la 20-a de septembro la virtuala kongresejo estos fermita, kaj UEA laŭgrade plu disponebligos la registritan enhavon ĉe sia jutubkanalo [UEAviva](https://www.youtube.com/channel/UCv1v1v1v1v1v1v1v1v1v1v1) – estu bonvena aboni kaj rekomendi nian kanalon!

Kaj ni esperas revidi vin en Belfasto! Aliĝu al la 106-a Universala Kongreso per la aliĝilo en la Monda Festivalo – <https://uk2021.mondafest.net/> (pago per kreditkarto, kun samtempa aliĝo al UEA 2021) – aŭ rekte en la retejo de UEA:

<https://uea.org/kongreso> (pago per ĉiuj pagmetodoj uzataj de UEA, inkluzive de UEA-kontoj).

Subtenu la laboron de UEA per aliĝo: <https://uea.org/alighoj/alighilo> – jam eblas aliĝi por 2021!

Salute, La VK-teamo

informas AEon **Katja Steele**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE

Filipina Esperanto Junularo

Sabaton, la 29an de aŭgusto 2020 la Filipina Esperanto Junularo prezentis la duan prelegaron el serio, kies celo estas celebri la 7 jariĝon de la asocio. La ĉefa temo rilatis al lingvoj. En insularo de 7 641 insuloj - la nombro konstante ŝanĝiĝas - kie 100 000 000 loĝantoj parolas 187 lingvojn, sen inkluzivi la dialektojn, kiel estis elektita komuna oficiala lingvo? Ĉu politiko cele konservi la diversecon de lingvoj eblas? Ĉu la registaro devas zorgi pri tio? Ĉu la parolantoj mem devas agi?

Se vi mistrafis la eventon, vi havas la oportunon trovi ĝin en Youtube kaj ĝui la entuziasmon de tiuj junaj novbakitaj esperantistoj. Dum ni nepre devas resti endome, jen ebleco virtuale vojaĝi kaj aŭdi lingvojn, kies nomon mi eĉ neniam aŭdis antaŭe. Sekvos pli da eventoj la 12an, 19an, 20an kaj 26an de septembro. Por akiri la detalojn iru al la retejo FEJ7-Jara:# PorNovaFej



informas **Franciska Toubale**



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Universala baza enspezo (UBI)

Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo.



Tio helpas solvi multajn nunajn problemojn de la tuta homaro **Roger Springer**



Kio estas Mono? Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo?

Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp. aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?

La bankmonoj (banknotoj, komputilaj ciferoj) estas ligitaj al energio, Ili devas egali al energio. Landaj kontekspertizistoj balanciĝas ĝin sed se ne, la Inflacio kaj malinflacio kontrolas tion. Do la monda problemo estas kiel ĝuste dividi tiun monon al la Homaro por ke ĉiuj povu vivi feliĉe. Ĉu vi konsentas?? **Roger Springer**



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

H a r o j k a j h a r o j .

SINCERAJ DEMANDOJ .

Mi scias, ke en la A.-E.-legantaro estas almenaŭ unu islamano (aŭ simpatianto de Islamo). Kaj mi petas iun ajn islamanon klarigi al ni, kial en islamaj landoj la virinoj devas kovri siajn kapharojn, kaj ne la viroj. Ekzemple: se la virinoj devas kovri siajn kapharojn ĉar vidante la kapharojn la viroj aŭtomate kaj eksterdece pensas (kaj revas) pri la haroj sur alia parto de la



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

virina korpo, tiukaze ankaŭ la viroj devas kaŝi siajn kapharojn ĉar vidi tiujn kapharojn igas la virinojn (kaj eĉ kelkajn virojn) pensi (kaj revii) pri la haroj sur alia parto de la vira korpo. Mi memoras, ke pasintan jaron en unu fama opero la kuraĝa germana reĝisoro ŝanĝis la kutimajn kapharojn de Salome al la alia parto de ŝia korpo por tranĉi kaj sendi ilin al sia amato, Johano la Baptisto.

Kaj mi ŝatus peti al la papo (papino ankoraŭ ne ekzistas) facile solvi la grandan problemon en la katolikaj preĝejoj de pastroj seksumantaj kun infanoj. Li povus kaŭzi ke preskaŭ neniuj pastroj farus tion se Li permesos al la pastroj seksumi kun la seksemaj pastrinoj. Facila kaj afabla solvo per kiu la eklezio gajnus multege da mono nebezona por kortumaj procesoj. Certe sanaj pastrinoj ŝatos la ŝanĝon. Kaj ambaŭ pastrinoj kaj pastroj ŝatos vidi la kaphararojn de la aliseksuloj. Kaj la eklezio ricevos pli da junaj membroj. Kaj oni ne bezonus zorgi pri Jezuo Kristo, ĉar Dio sendube provizis en la paradizo kunulinon. Same kiel Li Mem sendube trovis almenaŭ unu en sia Universo. Mi almenaŭ pensas tion. Se oni imagas, kiel Dio pensas kiel la homoj, oni povas ankaŭ imagi, ke li vivas kiel homo. **Marcel Leereveld.**

REGULOJ, REGULOJ !

Zamenhof praktikis du regulojn, sen formuli ilin. Ili ambaŭ temas pri gramatika redukto. La unuan la Akademio en 1914 oficiale formulis kaj priskribis, pro la insistado de Saussure kaj kun la aprobo de Zamenhof. La duan neniuj formulis, kaj oni eĉ ne konscias pri ĝi. Por kompari ilin, mi nomas la unuan REGULO A kaj la duan REGULO B.

1). La Akademio nomis REGULON A “La principoj de Necesado kaj de Sufiĉo”.

REGULON B mi nomas “La Regulo pri Signiforedukto”.

2). REGULO A temas pri la redukto ante al nenecesaj sufiksoj.

REGULO B temas pri la redukto ante al unu el la pluraj signiferoj de sufikso aŭ de finaĵo.

3). La redukto en REGULO A, de nenecesa sufikso, estas libervola kaj ŝanĝebla. Ekz. “malsanejo”.

La redukto en REGULO B, de signifero, estas deviga post komenco, kiel “falanto”=persono.

4). En REGULO A la Regulo aplikiĝas dum la Esperantisto kreas per vortkunmetado.

En REGULO B la nova vorto jam estas neŝanĝeble kreita kaj tiel uzata.

5). Parte sur la bazo de la kunteksto, en REGULO A ĉiu Esperantisto decidas ĉu kaj kiam forlasi iun

nenecesan sufikson, kiel en “malliber(ul)ejo”.

En REGULO B la nova vorto iam kreas de unu Esperantisto, kun la nova signifo, kaj ne plu

povas nuligati nek ŝanĝati, ĉar la procedo povas okazi nur unufoje. Ekzemple iam Zamenhof

decidis, ke ĉe la ses participaj sufiksoj, kiuj esence povas signifi personon aŭ aĵon aŭ econ, kiel

en “falanta (persono aŭ arbo aŭ prezo), la signiferoj (persono, aĵo, eco) reduktiĝas al nur

“persono”, SED NUR kiam ili estas substantivoj KAJ NUR post kiam unu Esperantisto

decidas kaj

publikigas pri tio. Zamenhof faris ĉi ĉion, kaj la procedo ne povas ŝanĝiĝi.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE

Same mi, antaŭ trideko da jaroj, decidis kaj publikigis KE SE LA SUFIKSO “-at-” estas uzata

kiel verbo, KAJ NUR TIAM, ĝi retenas sian signifon de pasiveco kaj ne plu enhavas aliajn

signiferojn kiaj tempo aŭ imperfekto (daŭro). Tio kreis VERBAN PASIVAN VOĈON unuvortan,

kiu antaŭe NE ekzistis en Esperanto (ankaŭ laŭ Kalocsay!). Do “la hundo BATATIS de la viro”

estas la Pasiva ekvivalento de la Aktiva “La viro BATIS la hundon”. Mi rajtis fari tiun decidon,

ĉar en tiu tempo neniu, aŭ preskaŭ neniu, Esperantisto uzis verban particon, kaj certe ne

“-ati”, en sia normala signifo de nuna aŭ daŭra tempoj.

Marcel Leereveld.



Amikumu estas plursistema aplikaĵo por saĝtelefonoj (Android kaj iOS) per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn aŭ parolantojn de aliaj lingvoj. La aplikaĵo funkcias dumaniere. Oni povas trovi proksimajn esperantistojn per listo aŭ per mapo. La aplikaĵo lanĉiĝis por esperantistoj je la 22-a de aprilo 2017. (fonto: eo.wikipedia.org/Amikumu). Ĝin kreis kaj funkciigas esperantistoj. Bonvolu legi ilian peton (krion) je helpo:

----- plusendita mesaĝo de <info@amikumu.com> ----- La fino de Amikumu?-----

Kara amiko,

La estonteco de Amikumu dependas de vi kaj la komunumo. Ni kalkulis, ke se ni ekhavas 500 novajn orajn membrojn ĉi-monate, ni povas daŭre funkciigi Amikumu kaj ni jam estas 10% tien! Ĉu ni povas dependi de vi por helpi al ni atingi nian celon kaj daŭrigi Amikumu longe en la estontecon? Tiel vi ĉiam povos trovi proksimajn esperantistojn ie ajn en la mondo!

<https://app.amikumu.com/orighu>

Por montri, ke ni seriozas pri la komunumo, ni nun reprogramas la tutan apon kaj malfermkodigos ĝin! Ĉi tiel la komunumo povas pli engaĝiĝi kaj kunfari la apon, tiel ĝia potencialo estos senlima. Ni ankaŭ aŭdis la zorgojn de la komunumo pri nia mesaĝilo, do ni decidis tute reprogrami tion de nulo por doni pli agrablan sperton.

Dankon, ke vi estas parto de nia komunumo kaj espereble ni povos renkontiĝis iutage por esperantumi kune! :) Por faciligi tion, dum limigita tempo, ni ofertas rabaton de 10%, do oriĝu nun ĉe <https://app.amikumu.com/orighu>.

Amikume via, **Chuck Smith**

Teknikestro de Amikumu <info@amikumu.com>



la Brizbana Esperanto- Societo ZOOM kunvenoj.

Je la dua dimanĉo de la monato : BES Novaĵoj

Je la kvara dimanĉo: Babilado/ Leciono Tempo: 14:00 - 14:30

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Por pasvorto kontaktu min per MESSENGER 0402766557 Kun multa dankemo,

via samideano, **Petro Danzer** 🌲



Pli da bona novaĵo dank' al Kovido-19. Nia Federacia Registaro hodiaŭ (fino de Aŭgusto) konfirmis, ke en la 2020-a junia jarkvarono, karbondioksidadaj emisioj estis ĉirkaŭ 10 milionoj da tunoj malpli ol antaŭ unu jaro. Jen redukto de proksimume 8%. Se la taksitaj emisioj vere estas je la malpleja nivelo ekde 1998 (konfirmota en Novembro), ili pezis 'nur' 518 milionojn da tunoj. Transporto estis la plej granda reduktopelilo; en tiu jarkvarono ni utiligis 27% malpli da benzino kaj 79% malpli da por jetaviadiloj benzino. Sendube nur kelktempa afero, sed iujn ajn pozitivaĵojn en ĉi tiuj malfeliĉaj tagoj ni ĉirkaŭ prenu. Cetere, kuraĝon, Melburnanoj.

Vera Payne



La 2008 Olimpikaj Torĉaj Protestoj

Ĉu vi memoras la mondprotestojn kontraŭ Ĉinujo dum la mondaj torĉparadoj?

Franca prezidanto Sarkozy eĉ diris, ke li vere konsideras "la eblon bojkoti la olimpikan malferman ceremonion en Pekino laŭ la evoluo de la situacio en Tibeto."

La rezulto estis ke la ĉina popolo bojkotis la multajn grandegajn francajn superbazarojn tra Ĉinujo. Ne estas saĝa mordi la manon kiu nutras vin **Roger Springer**



5/7/2020 · Aŭstralio sendis rekordan kvanton da fera erco al Ĉinio en junio, sed *Chinamax*-ŝipoj uzataj de brazila minista giganto Vale kaj ministoj en Afriko, povas transporti duone pli multe da ŝarĝo kiel normalaj ercaj ŝipoj. **Roger Springer**



3ZZZ la elsendo de la 31a de aŭgusto 2020 donas al la aŭskultantoj la oportunon aŭdi la festparoladon de FEJ 7-jara ,farita de Albert Stalin Garrido, la informojn kiujn Anna Löwenstein donis pri Lordo Mansfield en sia prelego pri Kenwood House kaj la klarigojn de Rudolf Krnacht pri kiel blindulo distingas la tagon disde la nokto

Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE